# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo:

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MAJO/OKTOBRO 2011** **Nro. 88 (3/11)**



Kiel anoncite, la sabaton 21-an de majo, ni kuniĝis en la kvartalo “Repélega”, en Portugalete, por festumi la 105-an datrevenon de la fondiĝo de la E-Grupo de Bilbao.

Post tagmanĝo en malmultekosta restoracio, ni translokiĝis al proksima loĝejo de Jesús M. García, kie daŭrigis vigla interparolado, pri la plej diversaj aferoj, ĝis la 9-a vespere, kiam kun bedaŭro ni devis adiaŭi unu la aliajn.

Sur la supra foto aperas la ĉeestantoj: (de maldekstre dekstren) Jesús M. García, Teodoro Ibáñez, Eduardo Larrouy, Iciar Arteche, José L. Bringas kaj Sabin Orueta.

**LOKE ...**

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

La vendredon 20-an de majo, laŭ postulas la statutoj de nia Asocio, oni okazigis la ĉiujaran ĝeneralan kunvenon. Krom la kutimaj aferoj pri spezoj, buĝeto, ktp. oni pritraktis aliajn jenajn:

- Ĉi-jare **la kvitancoj de la kristnaska loterio kostos po 5 eŭrojn ĉiu**, el kiuj 1 restos kiel donaco por la Grupo, dum oni ludas per 4 eŭroj.
- Oni decidis **eksigi**, kiel asocianoj, al **Igor Rapp** kaj al **Victoria Rodríguez** pro nepago de kotizoj.
- Oni decidis porti en rubaĵejon la diversajn **komputilojn** kiuj svarmis dise tra la Grup-ejo kaj kiuj taŭgis por nenio.
- **Paco López** proponis sin mem por daŭrigi la laboron cele al starigo de **TTT-ejo** de la Grupo.

## OBLIGACIOJ DE LA E-GRUPO DE BILBAO.

Laŭ nia promeso, la 1-an de junio estis redonita 20% el la deponita mono al tiuj, kiuj aĉetis obligaciojn de nia E-Grupo. Samtempe, tiuj kiuj deziris tion fari, povis demeti 30% de la tuta mono el la impostopago.

Alie, en junio ni pagis iom pli ol duono de la tuta ŝuldo al la najbarara komunumo por instalo de lifto. La laboro jam komencis en julio.

Koran dankon al ĉiuj obligaci-aĉetintoj sen kies helpo ni estus havintaj multe da malfacilaĵoj por kolekti la necesan monon.

## FORPASO.



La 26-an de majo forpasis, en Bilbao, nia kara amiko kaj veterana esperantisto **Vicente Plazaola Martínez**. Iam estrarano de la Grupo kaj entuziasma laboranto pro Esperanto, li apartenis al tiu multnombra aro de esperantistoj, kiuj ankaŭ estis fervoraj filatelistoj.

Malgraŭ ke lastatempe, pro malsano, li tre malofte vizitis nian sidejon, por ĉiam restos en nia memoro kiel, antaŭ ĉio, tre bonkora homo.

## VIZITO DE DU JAPANINOJ KAJ ALVENO DE VIETNAMINO.

La 5-an de aŭgusto vizitis nin du japanajn esperantistinojn, nome, Toŝiko Hotta kaj Sinobu Kamakura. Ili partoprenis la UK en Kopenhago kaj tuj poste translokiĝis al franca urbo Tours, de kie veturis al Bilbao.

Alie, 20-jara knabino el Vietnamio, lernantino de Aŭgusto Casquero, restos en Bilbao dum 6 monatoj pere de stipendio. Ŝi loĝos proksime de “La Casilla”.

# PRINTEMPA EŬSKA E-RENKONTIĜO OKAZIS EN TOLOSA.

La 14an de majo, sabate, okazis en Tolosa (Gipuzkoa) Printempa Eŭska Esperanta Renkontiĝo. Post kunigo en la Triangula Placo, ni vizitis la lokan ĉiusabatan kamparan merkaton. Ni kafumis en la drinkejo "Errota" kiu troviĝas en malnova muelejo apud la rivero Oria. Post promenado tra la urbo ni tagmanĝis en restoracio. Dum nia bongusta manĝado ni longdaŭre babilis pri movadaj kaj ekstermovadaj aferoj en bonega etoso.

Aŭtune okazos alia renkontiĝo, versajne en Altsasu aŭ en la ĉirkaŭaĵoj. Kompreneble vi ĉiuj legantoj de "Nia Ponto"estos bonvenaj. Ni retpoŝte informos vin , aŭ se ni estas akurataj pere de "Nia Ponto".

*(Raportis: Xabier Rico Iturriotz. 08/07/2011)*



Jen la ĉeestintoj de la evento. De maldekstre dekstren: Miren Elizagarai, Xabier Rico, Aitor Arana, Nikolas Xil, Rafa Blanco kaj Maritxu Arruti.

# LOTERÍA DE NAVIDAD.

Este año, **cada billete costará 5 euros**. De ellos, se jugarán 4 a la lotería y 1 quedará como donativo para el Grupo. Esperamos que los talonarios estén disponibles para la segunda quincena de Octubre.

## Demisio de la Prezidanto de HEF.

Karaj geamikoj, mi skribas al vi mallonge por anonci, ke pro sankialoj, pri kiuj eble kelkaj el vi jam legis en mia blogo http://www.ipernity.com/blog/pedroesperanto/316486 , mi decidis demisii kiel prezidanto de HEF tuj post la Hispana Kongreso en San Lorenzo de El Escorial.

Mia sanstato ne novas, kvankam lastatempe mi suferis gravan krizon. La cetero de la Estraro jam da antaŭlonge konas mian problemon, kaj dum periodoj mi devis tute ne okupiĝi pri miaj taskoj, kvankam la aliaj estraranoj ĉiam kuraĝigis min ne demisii, kaj atendi la plibonigon de mia stato.

Kiel vi povas kompreni, en tiu situacio mi ne nur bezonas senbalastigi mian vivon por vivi pli trankvile, ankaŭ mi ne povas alpreni respondecojn, aŭ taskojn, kiuj havas konkretajn limdatojn, ĉar mi ne povas garantii, kia estos mia stato estonte.

Mi esperas vian komprenemon. Mi klopodos plu agi por HEF, por Esperanto, kaj kunlabori tiagrade, kia permesas al mi mia malsano.

(*Pedro Hernández. 09/04/2011*)

## Legado de Don Kiĥoto.

Membroj de Madrida Esperanto-Liceo partoprenis denove en la jam tradicia laŭtlegado de la tuta verko "Don Kiĥoto de La Manĉo" en la madrida kulturejo "Circulo de Bellas Artes". La 28-an de aprilo je la 17:45, Tono del Barrio, Alejandro Pareja kaj Manolo Parra legis tri pecojn de la konata verko, laŭ la esperanta traduko de Fernando de Diego.
La aktivado estis spektebla en la retejo http://www.circulobellasartes.com/quijote11.php.
Post la legado, Toño del Barrio estis intervjuita de la radistacio de la kulturejo, "Radio Círculo".

*("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Majo 2011)*

## Nova provizora estraro de HEF ĝis venonta jaro.

La dimanĉon 3-an de junio okazis ĝenerala kunsido de HEF, laŭ antaŭkunvoko.
Krom diversaj ĝeneralaj temoj, pri kiuj la anoj ricevos informon en la koncerna oficiala protokolo, la ĉefa punkto de la tagordo, post la demisio de la prezidanto, estis la nomumo de estraranoj , kiuj deĵoros provizore ĝis la venonta renovigo de la estraro en 2012.

Estis elektitaj kiel novaj estraranoj:

- Prezidanto: José Antonio (Toño) del Barrio (Madrido)
- Vicprezidanto: Miguel Gutiérrez Adúriz (Santander)
- Voĉdonanto: Eduardo Berdor (Zaragozo)

Plu daŭrigas siajn respondecojn la jenaj estraranoj:

- Sekretario: Félix M. Jimenez Lobo
- Kasisto: Raúl Martínez Anguita
- Voĉdonanto: Juan Trenado
- Voĉdonanto (HEJS): Miguel Hernández

*(Félix M. Jimenez, Sekretario de HEF. 04/07/2011)*




La nova Prezidanto de HEF, Toño del Barrio, pozas, en la jaro 2008, dum la hispana kongreso en Kŭenko, kun kelkaj membroj de la E-Grupo de Bilbao.

## Diplomoj pri elstara agado al du iberianoj.

UEA-Diplomoj pri Elstara Agado i.a. al:
**Diplomo pri Elstara Agado**: *Augusto Casquero* pro instruado de Esperanto en Ĉinio kaj Vjetnamio.
**Diplomo pri Elstara Arta Agado**: *Abel Montagut* pro elstara kontribuo al la Esperanta poezio.

*(Francisco J. Moleón. 30/07/2011)*

# KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

## 19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.

Loko: MALGRAT DE MAR (BARCELONA) HISPANUJO
ADRESO: Hotelo. "Cartago Nova***" str. Passeig Maritimo 92
Dato: de la 1-a, ĝis la 8-a de oktobro 2011.
Koresponda adreso:
Luis Serrano Pérez. Apartado 423. E-08200 SABADELL (Barcelona) Hispanio.
Tel. (+34)93 727.50 21. Rete: luis_serrano@ya.com kaj luis_serrano@mixmail.com
http://personales.ya.com/semajno

## 35-a Kataluna kongreso.

La 35a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Barcelona, la 28an, 29an, 30an kaj 31an de oktobro. Legu ĉiujn detalojn, aliĝu kaj diskonigu ĉiun informon per la retejo: http://www.esperanto.cat/kongresoj/2011/
Amike,
Farri (Ferriol Macip i Bonet). Tel. +34 625 46 93 73

*(05/05/2011)*

# TRA LA MONDO ...

## Esperanta retradio.

*Rekomendinda al E-lernantoj ... kaj ne nur al ili !*

Kvankam pere de la esperantaj retradioj eblas ekzerciĝi pri la prononco de nia lingvo, ili donas nur la eblecon aŭskulti tekstojn sed sen ebleco vidi ilin skribitaj. Nun la aŭstro Anton Oberndorfer kreis "Esperanta Retradio", en kiu li proponas ĉiutage mallongan paroladon pri diversaj temoj. La avantaĝo estas ke en la retpaĝo, aldone al la sona aŭdado de la teksto, troviĝas tiu teksto laŭ skriba formo, kio estas tre efika por ekzerciĝado de la prononco.

Esperanta Retradio aŭdeblas kaj legeblas ĉe: http://aldone.de/retradio
http://members.aon.at/aldone/retradio/

(*Germain Pirlot. 06/04/2011*)

## Nova scienca libro "Origino de la vivo".

La libro "Origino de la vivo" aperis jam en majo, unu monaton pli frue ol antaŭvidite. Ĝi tuŝas plurajn sciencajn terenojn kiel biologio, kemio (kongrue kun la internacia jaro de Kemio), astronomio, astrobiologio kaj evoluteorioj. I.a. mi prezentos ĝin al la Israela asocio pri Astrobiologio kaj Origino de la vivo, en kies scienca konsilio mi membras. Vidu la enkondukon ĉe http://impeto.trovu.com/diversa/origino

*(Amri Wandel, Estrarano de UEA pri Scienca kaj Faka Agado. 08/05/2011)*

## Tradukilo kun E-o kiel cellingvo.

Interesa tradukilo, kiu enhavas E-on kiel celllingvon (apud multaj aliaj): www.itranslate4.eu. Atentinde estas, ke la tradukenda frazo produktas ne nur unu, sed eĉ kvin alternativajn tradukojn. Vi sekve povas mem elekti la por via celo plej trafan, aŭ elkopii popece el la tradukproponoj.

Vi povas ankaŭ voĉdoni por la plej trafa traduko (kio helpos plibonigi la sistemon), aŭ proponi propran pli trafan tradukon.

*(Francisco J. Moleón. 12/05/2011)*

## DVD Esperanto elektronike - nova antaŭmenda kampanjo.

Mi sendas al vi informojn pri la nova kampanjo de E@I, por antaŭmendi diskojn "Esperanto elektronike". Detala priskribo (ankaŭ kun fotoj de kovrilo) estas ankaŭ aldonitaj en la PDF-dosiero (sama PDF estas elŝutebla ankaŭ ĉe: http://files.esperantodvd.webnode.com/200000115-df520e04c8/DVD-EE_nova.pdf

Detalojn pri la disko vi trovos ankaŭ en la retejo: http://dvd.ikso.net - en la sekcioj: "Produktoj", "Fotogalerio" kaj "Mendoj".

*(Peter Baláž, E@I-kunordiganto. www.ikso.net. petro@ikso.et. 23/05/2011)*

## Evoluo de la membraro de UEA.

Aldone al la retaj rememorigoj, kiujn la Centra Oficejo faras de tempo al tempo, hieraŭ la CO dissendis paperan leteron al ĉiuj 1305 membroj de la jaroj 2010 kaj 2009, kiuj ne jam remembriĝis ĉi-jare. Fakte la nombro estus ĉ. 1700, sed la revarbilo ne estis sendita al tiuj, kies kotizon pagis Fondaĵo Canuto, au kiuj klare membriĝis nur pro UK.

El la pasintjaraj membroj ĝis nun 1107 ne remembriĝis. Samtempe aliĝis 598 novaj membroj. Kompare kun la definitiva membronombro pasintjara (5288) la deficito ĉi-momente do estas 509. Kompare kun la sama dato pasintjare ĝi estas 90. Krom al 1107 pasintjaraj membroj la varbilo iris al ducento da membroj en 2009, kiuj ne remembriĝis poste.

Plej multe la membronombro falis en Kubo, dum en la cetera mondo ĝi estas praktike tute sama. Fondaĵo Canuto pagis en 2010 "normalan" kotizon (MJ au MA) por 45 kubanoj. Krome 111 kubaj kongresanoj estis membrigitaj en la kategorio Membro kun Gvidlibro. El ili 6 estas membroj ankaŭ ĉi-jare dank' al amikoj el la UK. Multaj el la ceteraj 105 jam skribis al la CO pri sia deziro resti UEA-anoj. Ĉar MG por Kubo kostas 5 eŭrojn, la remembrigo de ĉiuj kostus 525 eŭrojn.

*(Osmo Buller, Ĝenerala Sekretario de UEA. 25/05/2011)*

## Por ŝatantoj de zombioj.

Lastatempe mi partoprenis en la duoblado al Esperanto de la filmo “Atako de la Lunaj Zombioj” (“Attack of the Moon Zombies”). http://www.sainteuphoria.com/aotmz.html

La reĝisoro, sinjoro Christopher R. Mihmm, prezentis la filmon en kinejo, la 25an de majo 2011. Samtempe aperis la DVD-on. La filmo daŭras 99 minutojn. En la kinejo, la filmo estas nur en la angla, sed je la fino aperas la listo de ĉiuj kunlaborantoj, inkluzive tiuj kiuj tradukis la tekston al Esperanto kaj tiuj kiuj voĉlegis en Esperanto. La filmo estas blanka-nigra. En la DVD oni povas elekti parolatan anglan aŭ parolatan Esperanton ... kaj skribitan anglan.

La DVD acxeteblas per la reto: http://www.sainteuphoria.com/merch.html#dvds La kosto estas 9.99 usonaj dolaroj plus sendokosto.

*(Toño del Barrio. 30/05/2011)*

## Kuriozaĵo: Esperanto en nekrologo.

Jen kurioza nekrologo: http://yfrog.com/h4ea0foj

(*Raúl Salinas Monteagudo. 08/07/2011*)

(*Noto: En la lasta alineo, eblas legi: “Profitu la tagon”*)



## Julio Verne kaj Esperanto.

Google atentigis min pri hispanlingva artikolo ĉe Kaos en la Red en kiu oni mencias Esperanton. Temas pri tre bela kaj rekomendinda artikolo pri Jules Verne:
http://www.kaosenlared.net/noticia/175095/jules-verne-lectura-anarquista

Sed en ĝi la mencio pri Esperanto entenas eraron: la aŭtoro diras ke en la submarŝipo Naŭtilus (de la verko 20.000 leŭgoj je submara vojaĝo) oni parolis Esperanton. Certe Jules Verne aludis al iaspeca planlingvo uzata en la submarŝipo. Sed ĝi ne povis esti Esperanto: la verko de Verne datumas je 1870, dum Esperanto nur naskiĝis en 1887.


Tamen, Jules Verne, post la apero de Esperanto fariĝis granda ŝatanto de nia lingvo (eble eĉ ĝin scipovis), ĝis la grado ke en lia nefinita lasta verko "Voyage d'Etudes" enmetis ĉapitron kun enorme laŭda enhavo pri Esperanto: vidu tiun tekston ĉe la paĝo:
http://www.telefonica.net/web2/dariorls/verne.pdf


*(Darío Rodríguez. 15/07/2011)*

Fakte la tuta verko "Voyages d'études" rilatas al Eo. Por scii pli pri Julio Verno k lia rilato al Eo: http://www.esperanto-sat.info/article1669.html

*(Vito Markovo. 15/07/2011)*

## La 6 esperantistoj nobelpremiitoj.






Sir William Ramsay (Ĥemio, 1904)
Joseph Thompson (Fiziko, 1906)
Alfred Hermann Fried (Paco, 1911)
Charles Richet (Medicino, 1913)
Daniel Bovet (Medicino, 1957)
Reinhard Selten (Ekonomio, 1994)

*(Etsuo Miyoshi, en „facebook“. 03/08/2011)*

## Paĝo pri nova longdaŭra filmo dublita esperanten.

Oni povas viziti paĝon kreitan far Enrike Ellemberg pri nova longdaŭra filmo dublita al Esperanto.Temas pri "Atako de la lunaj zombioj" : http://esperantofre.com/elna11/zombioj.htm

*(Darío Rodríguez. 16/08/2011)*